Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Ĵaŭdo, la 11-a de julio 2019


*N-ro 6*




## "Litvo – patrujo mia"

Vendrede posttagmeze je 16:00 okazos en la ĉefsalono de la universitata konstruaĵo projekciado de la filmo de Roman Dobrzyński „Litvo – patrujo mia".

Pasintjare okazis la unua interŝanĝo de junaj esperantistaj grupoj de Pollando kaj Litovio, kadre de la programo Erasmus+. La sesdeko da gejunuloj vizitis Litovion laŭ la spuroj de Adamo Mickiewicz – la poeto de du landoj.




Kialo de la kunlaboro de la projekto estis la centa datreveno de eldono de „Sinjoro Tadeo" en Esperanto. Tiu ĉi verko estis mejloŝtono en Esperanta Literaturo. La tradukinto Antoni Grabowski gajnis pro tio la titolon „Patro de la Esperanta poezio".

**Centro de Interkultura Edukado–Pollando**
kaj **Litova Esperanto–Asocio**



## Programo

### La 12-an de julio (vendredo)

| | |
|---|---|
| **7.00–8.00:** | Matenmanĝo – la unua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Matenmanĝo – la dua alterno. |
| **10.00–11.00:** | Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117). |
| **10.00–11.00:** | Prelego de Anna Striganova "Fantazio kaj fantastiko": la unua parto (ĉambro 204). |
| **10.00–11.00:** | Prelego de d-ro Gábor Márkus "La Espero" (ĉambro 118). |
| **10.00–12.00:** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (ĉambroj 303-311). |
| **11.00–12.00:** | Prelego de prof. Ilona Koutny "Universitata instruado de Esperanto: ĉu lukso, ĉu prestiĝo? (ĉambro 117)." |
| **11.00–12.00:** | Prelego de Mikaelo Bronŝtejn "SEJM legendara" (ĉambro 124). |
| **11.00–12.00:** | Prelegserio de prof. Walter Żelazny pri religioj: la kvina prelego (ĉambro 118). |
| **12.30–13.30:** | Tagmanĝo – la unua alterno. |
| **13.30–14.30:** | Tagmanĝo – la dua alterno. |
| **15.00–16.00:** | Prelego de d-ro Orlando Raola "Kemio kaj mediprotektado en la biosfero" (ĉambro 118). |
| **15.00–16.00:** | Prelego de Anna Striganova "Fantazio kaj fantastiko": la dua parto (ĉambro 204). |
| **15.00–16.00:** | Prelego de prof. Gong Xiaofeng "Kiel efike atingi kapablojn de Esperanto-instruantoj" (ĉambro 124). |
| **15.00–16.00:** | Sinjorino Suzanne Roy informos pri la UK 2020 en Kanado (ĉambro 310) |
| **16.00–17.00:** | Prelego de prof. Aleksandr Melnikov "Lingva personeco de tipa Esperanto-kulturano" (ĉambro 117). |

# „Kio? Kie? Kiam?“

**Kvizo kun Damir Kurbangaleev okazos, kun helpo de Dima kaj Anna, ĵaŭde je 11.00 en la ĉambro 204.**

Pri kio temas? „Kio? Kie? Kiam?“ (KKK) estas rusia televida kvizo, kiu naskis grandan ludan movadon. Kial? Ĉar ludante ordinarajn kvizojn ni devas precize scii la respondon. Ĉefa distingo de KKK estas, ke ludante KKK vi eltrovas respondon, kiun vi povas ne scii antaŭe. Kaj plej granda plezuro estas trovi respondon tra diskutadoj kaj pasmovi ideojn kun kunludantoj.

| | | |
|---|---|---|
| *1. mi* | *6. ili* | *11. kiu* |
| *2. vi* | *7. ĉi tiu, ĉi tio* | *12. kio* |
| *3. li, ŝi, ĝi* | *8. tiu, tio* | *13. kie* |
| *4. ni* | *9. ĉi tie* | *14. kiam* |
| *5. vi* | *10. tie* | *15. kiel* |

*Vortlisto de Svodeŝ – estas instrumento por taksi gradon de parenceco inter malsamaj lingvoj. Ĝi estas normigita listo de bazaj leksemoj de lingvo, ordonita de malpliiĝanta ilia „bazeco“ aŭ historia daŭrigeblo. Jen la unuaj dek kvin vortoj de la norma vortlisto de Svodeŝ por la rusa lingvo (tradukita en Esperanto). Restarigu la vortojn numeritajn 12, 13 kaj 14.* Pensu pri la respondo al la demando dum minuto aŭ du. Unuarigarde, vi ne povas trovi la respondon.




Vi ne scias, kio estas vortlisto de Svodeŝ, kaj kiu estas Svodeŝ, vi eble scias nenion pri la rusa lingvo ktp.

Sed ĉi tie estas kaŭzo, ke vi havas ĉi tiun demandon, kaj ĉi tie estas la vojo respondi ĝin.

Vi povas ne scii, kaj vi povas respondi. Kiel? Memoru, ke la demando devas esti interesa, ĝi devas havi iun specialaĵeton. La vera respondo devas konveni, kvazaŭ la vera parto de pazlo.

Ĉi tie interese estas, ke vi certe scias ĉi tiujn vortojn. Vi povas trovi ilin en la nomo de ludo: „kio, kie, kiam“.

Gravas, ke vi povas ne koni la respondon, sed trovi ĝin. Eble en la demando mem, eble en erudicio, kiun vi havas.

**16.00–17.00:** Prelego de Dima Ŝevĉenko “Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto”: la dua parto (ĉambro 124).

**16.00–17.00:** Prelego de Peter Kühnel “Baŭhaŭsa arta stilo – mallonga periodo de 1919 ĝis 1933” (ĉambro 118).

**16.00–17.00:** Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja (ĉambro 206).

**16.00–17.00:** „Litvo – patrujo mia“. Filmo de Roman Dobrzyński pri interŝanĝo de gejunuloj polaj kaj litovaj kadre de la programo Erasmus+ (ĉefsalono).


**17.30–18.30:** Vespermanĝo – la unua alterno.

**18.30–19.30:** Vespermanĝo – la dua alterno.

**20.00–21.00:** Koncerto de Zuzanna Kornicka (ĉefsalono).



# Taksioj



Laŭ instigo de Inesa Čenienė mi ĵus uzis taksiservon „Bolt“. Ĝi tre bone funkcias; taksio venis tri minutojn post mendado kaj kostis nur 3 €, por vojaĝo inter la BET-ejo kaj mia loĝejo (Kranto gatve). Bolt funkcias per poŝtelefona aplikaĵo. Eble disvastigindas per „Abelo“, ke ekzistas tiu servo. Vidu:

0.80€ BASE
0.33€ KM + 0.12€ MIN
2.00€ MINIMUM

*https://bolt.eu/cities/panevezys/*
Ĉio bedaŭrinde funkcias nur en la angla.


**Yves Nevelsteen**

# Manĝmenuo por BET-55

**La 6a tago, vendredo** (2019-07-12)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kuiritaj ovoj | 2 ovoj |
| | Majonezo | 30 g |
| | Pano (nigra, blanka) | 40 g |
| | Bulketo | 50 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Piza supo | 250 g |
| | Fritita fiŝo | 100 g |
| | Fritita kokaĵo | 100 g |
| | Kuirita rizo | 100 g |
| | Freŝaj legomoj | 100 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Kotleteto el porkaĵo | 100g |
| | Kuiritaj fagopiroj | 100 g |
| | Legomoj | 100 g |
| | Flanoj kun kazeo, kremo | 200/20 |
| | Teo | 200 g |

# Plastaĵoj en akvosferoj



Mia prelego „Plastaĵoj en akvosferoj“ kaj pri Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) okazos ĵaŭde 11.00 en la ĉambro 124. Mi invitas vin partopreni, ĉar temas pri aktuala temo. En la kongreslibro estas nur tre konciza informo.

Grava afero estas ankaŭ adiciaj kemiaĵoj en la plastaĵoj por plibonigi aŭ krei iliajn utilajn ecojn. Kelkaj el tiuj agas simile kiel naturaj hormonoj, kaj ĝenas organismon de la homo kaj de aliaj bestoj. Aliaj povas kaŭzi kanceron. Vi povas legi pri tio en la retejo de AVE, Asocio de Verduloj Esperantistaj: ***www.verduloj.org*** > klaku al Dokumentoj > serĉu Akvo: tie vi trovos la prelegon (en aŭgusto la aktualan version).

Krome indas mencii, ke AVE kunlaboras tutmonde kun la Verdaj Partioj, montras al ili la avantaĝojn de Esperanto kaj tradukas la plej gravajn dokumentojn de tiuj partioj en Esperanton. Parte vi trovas ilin sur la retejoj de la Verdaj Partioj, ekzemple: *www.globalgreens.org* > serĉu „Esperanto“. Por koreoj, japanoj kaj ĉinoj interese estas, ke en 2021 okazos la 4-a Tutmonda Kongreso de „Global Greens“ en Seulo. AVE intencas partopreni kiel kutime, por montri Esperanton.

Se vi interesiĝas pri AVE, bonvolu skribi al mi, la sekretario: *manfred@westermayer.de*

**Manfred Westermayer**




# Kongreso de KELI

La 69-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazos 10-17 aŭg. 2019 en Révfülöp, bela malgranda vilaĝo ĉe la plaĝo de Balatono, Hungario. Riĉa programo: prelegoj, kantado, ekskursoj kaj prezentadoj. KELI esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado:

***agnes@raczkevy-eotvos.com; http://keli.chez.com/***

# Pri la koncerto de Kaŝi



**Lunde vespere okazis en la ĉefsalono de la universitata konstruaĵo koncerto de Kaŝi.**

Dum la mirinda koncerto oni ĝuis ankaŭ la kanton „Miliono da zorgoj“. Ĉi kanton kreis la fama latva komponisto Raimonds Pauls, laŭ verso de latva poeto. Post kelka tempo laŭ la sama melodio la kanton famigis la fama rusa kantistino Alla Pugaĉova. Kun la sama melodio, sed la vortoj tute ne koincidis kun la latva originalo. La kanto danke al ŝi famiĝis ne nur en la vasta Rusio, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj.

25th 1-2-3.08.2019 Pol'and'Rock Kostrzyn nad Odrą FESTIVAL POLAND

# ALVOKO

**Helpu savi la Multkulturan Vilaĝon Esperanto dum la Festivalo Pol‘and‘Rock!**

La Esperanto-Vilaĝo laboros de la 31-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 2019. Legu pli en „Abelo 3“, 3-a paĝo.

Ni povas inviti 2-3 gejunulojn, parolantajn pole kaj aŭ Esperante, kiuj havos la taskon deĵori ĉe la informa stando pri la Esperanto-movado.

**Loko de la aranĝo:** pola/germana landlimo ĉe la urbo Kostrzyn ĉe Odro; **Restado** senpaga en tendo, manĝigo de volontuloj; havu dormsakon aŭ lankovrilon. **Grave:** venu memstare!

**Ni bezonas ankaŭ financan helpon** pro la kriza situacio ĉe UEA. Se vi pretas monhelpi tiun ĉi grandan informkampanjon (rokmuzika festivalo por 700 mil homoj!) – bonvolu kolekti monon por la ĉeforganizantino Halina Komar el Pollando. Pliaj informoj:

*halina.komar@gmail.com; www.gazetaro.org/polandrock/*

## ATENTON!

**Vendrede la 10-an de junio je la 15.00 en la salono 310 sinjorino Suzanna Roy informos pri la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. Bonvenon!**

# La ekskursoj dum BET-55

Marde kaj merkrede okazis tuttagaj ekskursoj kun biergustumado en Biržai-kastelo, vizito de bienpalaco de Pakruojis kun florfestivalo kaj tagmanĝo en la bieno. Jen kelkaj fotoj de Gražvydas Jurgelevičius el la ekskursoj kaj de la vespera marda koncerto de Amira Chune:










# Prelegoj de A. Melnikov

**Li prelegis marde pri „Leksikaj novismoj kaj neologismoj: *anatemi* aŭ *odi*?“.**

Neologismoj estas ofte ne bonveniga afero precipe por azianoj, ĉar Esperanto ĉefe baziĝas sur eŭropaj okcidentaj lingvoj. Sed li brile kaj nekredeble sprite prelegis pri neologismoj, kiuj riskas esti sekaj. Nepre rekomendinda prelego! **Ermito el Koreio**

D-ro hab. Aleksandro S. Melnikov preskaŭ la tutan sian sciencan agadon dediĉis al interlingvistiko kaj esperantologio. Ambaŭ disertaĵoj por duŝtupa doktoreco, deko da libroj (sciencaj, popularigaj, lerno- kaj instruhelpaj), cento da artikoloj, aro da prelegoj en sciencaj kaj Esperantaj konferencoj – jen estas spuroj de tiu agado.

Lia provizore (!) lasta libro donis la titolon al la unua ero de la preleg-serio en BET. Kiel aperis E-vorto, kiom da vizaĝoj ĝi havas, kiajn asociojn ĝi elvokas, kiel ŝanĝiĝas kun tempo ĝia signifo, kio estas metaforo kaj metonimio – la liston de la prelegeroj eblas daŭrigi.

Zamenhof, sendube, estis genia, sed ĉu li prognozetetis, ke la lingvo kreos propran kulturon kaj eĉ kvazŭetnon? Ĉu vi rimarkis eraron? Se ne, venu aŭskulti la prelegon, kiu okazos la 11-an je 16.00. La temo: “Kiel artefarita lingvo kvazaŭetnon kreis”.

## Atenton!!!

**Por ke la adiaŭa koncerto, okazonta vendrede 13.07.2019 estu interesa kaj sukcesa, ĉiuj dezirantoj partopreni estas petataj urĝe kontaktiĝi kun s-ro Mikaelo Lineckij, kiu kompilas la programon!!!**